


# *Bulgara* **ESPERANTISTO**

0294



12  
1970

## E N H A V O

|                                                                                 |    |
|---------------------------------------------------------------------------------|----|
| <b>Nikola Aleksiev.</b> Inspiranto de la paca politiko de PR Bulgario . . . . . | 1  |
| <b>Prof. S. N. Podkaminer.</b> Lenin kaj Esperanto . . . . .                    | 3  |
| <b>Dimitr Mutuŝev.</b> Intervjuo kun Branimir Grigorov . . . . .                | 9  |
| <b>Doĉko Doĉev.</b> Esperanto amikigas la bonvolemajn homojn .                  | 10 |
| <b>Ivan Sarafov.</b> Grava datreveno . . . . .                                  | 11 |
| <b>Georgi Stanev.</b> Sukcesa E-kunveno en Orjaĥovo . . . . .                   | 12 |
| <b>Kovo.</b> Imitinda iniciato . . . . .                                        | 13 |
| * * * En Dospat duan jaron Esperanto . . . . .                                  | 14 |
| <b>Rajna Arnaudova.</b> III Pupteatra Internacia Festivalo (PIF) .              | 14 |
| <b>B.</b> Al festivalo kaj seminario en Pollando . . . . .                      | 14 |
| <b>B. Batalska.</b> Rekomendo pri la lingvo de la proksima estonteco . . . . .  | 15 |
| * * * En Kubo intereso pri Esperanto . . . . .                                  | 16 |
| * * * Unua centra renkontiĝo de la esperantistoj en GDR .                       | 16 |
| * * * Moviĝanta kongreso en Mediteraneo . . . . .                               | 16 |
| * * * Rumana kunordiga Esperanto-komitato . . . . .                             | 16 |
| * * * Distroj. Kuriozaj faktoj. Tra la gazetaro. Nekrologoj .                   |    |

### Sur la kovrilpaĝo:

Esperanto-kurso de lernantoj en u. Dospat, Rodopi-montaro  
(vd p. 14). Gvidanto Emil Ĉirpanski (dekstre, malantaŭe)

*Abonkotizo: jara — 1,40 levoj, duonjara — 0,70 lv. Por eksterlando—2 lv., 2 rubloj, 2 dolaroj aŭ egalvaloro; por Albanio, ĈSSR, Hungario, Jugoslavio, Pollando kaj Rumanio — 1,60 lv. Por Italio — 1000 liroj. Aparta numero—0,14 lv. Reklamtarifo: 0,15 lv. por cm<sup>2</sup>; sur tuta kovrilpaĝo — 80 lv.; korespond-anoncoj: 5 stotinkoj por ĉiu vorto; eksterlandaj adresoj — publikigataj senpage.*

### EKSTERLANDAJ PERANTOJ DE „BULGARA ESPERANTISTO“

(Pliaj perantoj el diversaj landoj estas serĉataj)

**ALBANIO:** Ing. Cefo Fiko, R. Kongresi Përmetit 7—11/10, Tirane.

**ITALIO:** Julia Franceschi, str. Francesco Nullo 2, Padova.

**KOREO:** Korea Fsp. Asocio, Pjeng' jang P. O. kesto 16.

**NEDERLANDO:** Ru Bossong, Floraplein 2 Eindhoven.

**RUMANIO:** Mihail Popescu, Cal. 13 Septembrie 65, Bukuresti 5.

**SOVET-UNIO:** Ivan Palkin, ul. Televidenija, D. 7, kor. 3, kv. 44, Moskva M—449.

**SVEDIO:** Karl Kvist, Deje, Box 109.

**INSPIRANTO DE LA PACA POLITIKO DE PR BULGARIO**

Ni jam alpaŝas la Novan Jaron 1971. Ni povas fieri pri la atingajoj de nia popolo dum la pasinta 1970 kaj renkonti kun certeco la Novan Jaron, ĉar ankaŭ dum ĝi Popola Respubliko Bulgario nepre faros novajn paŝojn en sia progresema evoluado sur la vojo de matura socialisma socio.

Sed por garantii pacajn kondiĉojn por la krea ĉiutaga laboro de nia popolo, nia ĉefa direktanta forto Bulgara Komunista Partio gvidas firman politikon de batalo kontraŭ la agresemaj fortoj de la internacia imperiismo. La inspiranto de ĉiuj paciniciatoj en nia lando estas nome la partio de la bulgaraj komunistoj. De sia fondiĝo ĝis nun la Komunista Partio analizas science la kaŭzojn ĉe la militoj kaj sur tiu bazo difinas sian propran pozicion. Ĝi ne estas pacifista partio. Ĝi faras severan diferencon inter militoj sklavigaj, subpremigaj, imperiismaj kaj militoj liberigaj, justaj, kontraŭimperiismaj, kiaj estas la armitaj luktoj de la koloniaj kaj aliaj subpremitaj popoloj por nacia liberiĝo, por politika kaj ekonomia sendependado. Nur starante sur tiu pozicio oni povas bone kompreni la rilaton de PR Bulgario kaj de la sociaj organizaĵoj en nia lando al la plej akraj kontraŭdiroj en la hodiaŭa mondo kaj al la militoj, gvidataj en diversaj partoj de nia planedo.

La Bulgara Komunista Partio en la aktuala internacia situacio instruas nin subteni per ĉiuj fortoj la liberigan batalon de la heroecaj popoloj en Hindoĉinia Duoninsulo — la vjetnama, la kamboĝa kaj la laosa, kiuj estas viktimoj de la agresema imperiisma milito de Usono. Ĝi instruas nin subteni decide la pozicion de la arabaj popoloj kontraŭ la agresa invado de Israelo en iliajn teritoriojn kaj por la reliberigo de la provizore okupitaj arabaj regionoj. La Partio helpas al ni vidi hipokritan rolon de la internacia imperiismo, frunte kun la usona, kiu staras post la dorso de Israelo kaj transformas tiun regionon de la terglobo en tre danĝeran militfajrujon. Ĝi helpas al ni kompreni la justajn kialojn de la batalo de koloniaj popoloj (armita aŭ nearmita) por plena likvido de la senhonora koloniisma kaj neokoloniisma jugo.

La venko de la liberamaj popoloj prezentos venkon de la tuta homaro kaj bridos la manojn de la fiamaj militistaj rondoj.

La Partio instruas nin kompreni la absolutan neceson de larĝa, bone organizita amasa porpaca batalo en ĉiuj teranguloj, kiu povas likvidi la ekzistantajn militfajrujojn kaj forigi por ĉiam la minacon de nova, tria raket-nuklea milito. Kaj ne nur kompreni tion, ne nur esprimi nian pasivan aprobon de simila pacagado, sed persone aktive partopreni ĝin. La fronto de la pacbatalo estas tiom larĝa, ke en ĝi povas trovi sian decan lokon ĉiuj homoj kun bona volo: komunistoj, socialistoj, demokratoj, kredantoj kaj nekredantoj, katolikoj, mahometanoj, protestantoj k. a. La karaktero de la nun-

tempaj militarmiloj estas tia, ke se ni permesos eksplodon de tutmonda milito, ĉiuj popoloj kaj ĉiuj tavoloj de la popoloj fariĝos amase viktimoj de la milituragano. Kiam en la daŭro de sekundoj la loĝantaro de Hiroŝima kaj Nagasaki pereis sub la atombomboj de usonaj aviadiloj, ĉu la viktimoj havis eblecon diskuti pri la diferencoj de siaj filozofiaj, religiaj aŭ politikaj konvinkoj? Tio ja estas tute neebla. Ĉiuj sendiference de siaj konvinkoj pagis per sia vivo aŭ per peza vundiĝo kaj longjara malsanado kun fatala vivofino la senfinan senhomecon de la imperiismaj barbaroj de la tipo de tiama usona prezidanto, kiu faris sian ordinaran preĝon kaj poste ordonis la bombardon... Kia hipokriteco kaj krimeco kaŝas sin sub la masko de lia ŝajna religio!

Ni, la bulgaraj esperantistoj, egale partianoj aŭ senpartiaj, komprenas, ke la tradicia esperantista opoziciemo kontraŭ la militoj, kiel rimedo por solvado de interŝtataj disputproblemoj, trovas plej bonan apogon en la scienca pozicio de la Komunista Partio en tiu gravega por nia popolo kaj por la homaro problemo. Tial ni elkore dankas al la Partio por ĝia subteno de niaj pacaj streboj, de nia internaciismo kaj kontraŭrasismo. Ni ankaŭ partoprenas praktike en la realigado de aktiva porpaca agado inter esperantistoj kaj kune kun neesperantistaj pacmovadoj.

La longjara kaj malfacila pacbatalo povas venki nur rezulte de unuigitaj klopodoj de multaj kaj diversaj organizaĵoj. La porpaca agado de Bulgara Esperantista Asocio kaj de Bulgara MEM-Komitato estas plej ofte intime ligita kun simila agado de la partiaj, junularaj, sindikataj, sportaj kaj aliaj organizaĵoj kaj kun la komitatoj de virinoj, abstinuloj kaj precipe de la komitatoj por defendo de la paco, kiuj ekzistas sur la teritorio de la tuta lando je diversaj niveloj.

La porpaca aktiveco de bulgara esperantistaro estas bone taksata de ĉiuj pacemaj medioj en nia lando. Kiel sciante, nia lando per speciala leĝo malpermesas kaj severe punas ĉiun pormilitan propagandon. Por nia popolo kaj por la bulgaraj esperantistoj la paco estas supera bono. Oni devas vigle kaj konstante gardi ĝin kontraŭ la provoj de la militinstigantoj en la tendaro de la imperiismo jeti la homaron en la abismon de nevidita ĝis nun amasa buĉejo, kiu ruinigos la tutan homan kulturon kaj civilizon.

La alproksimiĝanta Deko Kongreso de Bulgara Komunista Partio certe faros pritakson de la agado de la tuta popolo por efektiviĝo de la porpaca politiko de nia lando kaj donos novan puŝon al ĉiufankaj porpacaj streboj de PR Bulgario. Ni kun intereso atendas la kongresdecidojn kaj inspire laboras por renkonti la Kongreson per novaj sukcesoj ankaŭ sur la tereno de la pacbatalo.

## ESTONA RADIO EKUZIS ESPERANTON

(IGS/734) Tallinn, Estona SSR. — Antaŭ 2 jaroj en Litova SSR oni ekinstruis la Internacian Lingvon Esperanto en 19 lernejoj. Nun en Estona SSR okazis simila novaĵo en la fako radia. Estona Radio septembre disaŭdigis la unuan programon en Esperanto kaj poste decidis regule plu brodkasti esperantlingve al la eŭropaj landoj.

## E-RENKONTIĜO EN LEIPZIG

Internacia Renkontiĝo en Leipzig (Lajpcig) okazos dum la printempa foiro 1971 la 20-an de marto je la 19-a horo en Klubder Intelligenz „Gottfried Wilhelm Leibnitz“, Elsterstr. 35. Kulturprogramo, parolos eksterlandanoj, Esperanto-filmo ktp. Informu vin ĉe Germana Kulturligo-Esperanto, 701 Leipzig, Kathe-Kollwitz-Str. 115, GDR.



Prof. S. N. Podkaminer, Leningrad

(daŭrigo el № 11 de „B. E“)

### 3. Lenin — ĉu parolinta Esperanton?

Nun ni transiru al la analizo de la asertoj diametre kontraŭaj, kies aŭtoroj penas pruvi, ke Lenin ne nur favoris Esperanton kaj kelkfoje publike deklaris pri tio, sed eĉ mem estis esperantisto kaj iufoje prelegis esperantlingve.

Oni povas facile kompreni, kiom allogi estas por la esperantistoj precipe en la socialismaj landoj, konsideri Lenin samideano kaj favora adepto de nia lingvo. Sed tamen oni devas ne forgesi la tre grandan respondecon de similaj asertoj, kiuj kaŭze de ilia malĝusteco aŭ neeblo konfirmi ilin per nerefuteblaj faktoj kaj dokumentoj, donas fortan armilon en la manojn de la kontraŭuloj kaj anstataŭ helpi al nia Movado, tre malutilos al ĝi.

Precipe la singardemo estas necesarilate al la asertoj publikigitaj en la Esperanta gazetar.

La plej aktiva disvastiganto de la aserto pri la esperantisteco de Lenin estas la malnova latva esperantisto, veterano de nia Movado, *Ints Ĉaĉe*. Liaj artikoloj, dediĉitaj al la rilato de Lenin al Esperanto, jam aperis en *kelkaj Esperantaj revuoj*, inkluzive „*Esperanto*“ de UEA, „*The British esperantist*“ kaj aliaj. En siaj rememoroj Ints Ĉaĉe skribas, ke en la jaro 1918 „la persona sekretario de Lenin, la poligloto kapitano Ernest Karloviĉ Drezen . . . avizis min, ke por sabato, la 13-an de aprilo je la 13-a horo, Lenin invitas la reprezentantojn de la Societo (temas pri la tiamasocieto „Espero“ — S. P.) viziti lin en la instituto „Smolnij“<sup>10</sup>. Laŭ la asertoj de Ĉaĉe tiu ĉi renkontiĝo okazis. La reprezentantoj estis la konata esperan-

tisto poeto V. N. *Devjatnin* kaj I. Ĉaĉe. Dum la interparoloj Lenin diris — laŭ Ints Ĉaĉe — ke necesas kunvoki tutruslandan kongreson de la esperantistoj en Petrogrado kaj eĉ indikis, ke devas veni po unu delegito de ĉiuj 300 esperantistoj pagintaj membrokategoriojn.

En tiu ĉi rememoro estas malprecizaĵoj, kiuj faras la cititajn indikojn pli ol dubindaj:

- a) Laŭ la sciigo de IMEL en ĝiaj leteroj al la germanaj kaj sovetaĵ esperantistoj, E. Drezen ne estis persona sekretario de Lenin.
- b) Ints Ĉaĉe asertis, ke la 13-an de aprilo 1918 je la 13-a horo Lenin en Smolnij (en Petrogrado) akceptis en ĉeesto de E. K. Drezen la reprezentantojn de la Petrograda Esperanto-societo „Espero“ V. N. Devjatnin kaj I. Ĉaĉe. Dum la interparolado, kiu daŭris 42 minutojn Lenin diris, laŭ Ĉaĉe, ke „oni devas kunvoki Tutruslandan kongreson de esperantistoj en Petrogrado“.

IMEL oficiale atestis, ke en aprilo 1918 la Sovetia Registaro kaj Lenin jam estis translokiĝintaj en Moskvon. Tial tiu ĉi renkontiĝo ne povis okazi en la tago kaj horo menciitaj de Ĉaĉe.

Sed eble ni estas tro postulemaj rilate la asertojn de Ĉaĉe, kiu povus iom miksi la datojn kaj horojn, sed ja gravas la fakto de la renkontiĝo mem. Sed bedaŭrinde la fakto mem estas ankaŭ pli ol dubinda:

**Unue**, estas tre strange, ke tiom klara kaj kategoria decido de Lenin rilate la kunvokon de III-a tutrusia Esperanto-kongreso estis realigita nur en la jaro 1921, t. e. post tri jaroj de la momento kiam Lenin diris pri la neceso kunvenigi la esperantistojn.

<sup>10</sup> „*Esperanto*“, oficiala organo de UEA, Rotterdam, februaro 1969, pĝ. 26.

**Due,** la aŭtoro de tiu ĉi artikolo partoprenis en la jaro 1921 aktive la agadon de la Petrograda societo „Espero“, kunlaborante kun Ĉaĉe kaj Devjatnin, kaj helpis la preparlaborojn por la III-a Tutrusia Esperanto-kongreso. Li estis elektita de la Kongreso kiel membro-kandidato de la unua Centra Komitato de SEU (Sovetrespublikara Esperantista Unuiĝo) kaj dum pluaj jaroj estis reelektata kiel membro de la CK de SEU. Li multfoje havis interparolojn pri Esperanto-aferoj kun Devjatnin kaj kun la ĝenerala sekretario de SEU E. K. Drezen (ambaŭ, asertas I. Ĉaĉe, partoprenis la menciitan renkontiĝon kun Lenin. (Nek la unua, nek la dua iam ajn, eĉ alude, ekmemoris pri la renkontiĝo. Eĉ kiam en la jaro 1928 en CK de SEU estis pridiskutita la supre menciita kontraŭesperanta artikolo de M. I. Uljanova kaj oni pridiskutis la tekston de la respondo, eĉ per unu vorto ne estis menciita ia simpatio de Lenin al Esperanto.

**Trie,** en Leningrado tiutempe aktive partoprenis la Esperanto-movadon du veteranoj. G. N. Teterin, la unua prezidanto de la Leningrada Esperanto-klubo, kiu en la jaroj 1920—21 kunlaboris kun Ĉaĉe, kaj A. N. Pilev, la nuna estrarano de la Leningrada Esperanto-klubo, kiu en la jaroj 1918—19 estis la vicprezidanto de la societo „Espero“. Nek la unua, nek la dua povas rememori iujn informojn flanke de Devjatnin kaj Ĉaĉe pri la renkontiĝo kaj konsideras ĝin ne okazinta.

Ĉu ne estas pli ol strange, ke I. Ĉaĉe kaj Devjatnin, havinte tiel ekstreme gravan por la Movado fakton, kaŝis ĝin de siaj proksimaj kunlaborantoj?

c) I. Ĉaĉe asertas, ke la 19-an de junio Lenin parolis esperantlingve dum la Brusela Kongreso de la II-a Internacio.

IMEL informis, ke Lenin ne partoprenis la Bruselan Kongreson

de la II-a Internacio kaj ne estis tiutempe en Bruselo.

d) En siaj rememoroj I. Ĉaĉe skribas: „*La historiaj datoj certigas al ni, ke jam en la jaro 1912 Vladimir Iliĉ Lenin anoncis sin antaŭ la tuta homaro kiel esperantisto. Dum la VIII-a Tutmonda Esperanto-Kongreso en Krakov la 13-an de aŭgusto je la 13-a horo de la granda salono de „Stary Teatr“, Lenin Uljanov deklaris al la tuta mondo, ke: „Neniu nacio kaj neniu lingvo estu privilegiitaj. Esperanto estas la latino de la proletaro, kaj mi esperas, ke dank’ al ĝia facileco, ĉi tiu lingvo helpos al la monda interkompreniĝo!“*

Laŭ multnombraj atestoj de homoj, kiuj bone konis Lenin kaj kontaktiĝis kun li dum lia estado en Krakov kaj Poronino, estas konate, ke Lenin atente observata de la aŭstria polico kaj dezirante eviti iujn provokagojn ĝiaflanke, kondukis tre singardeme.

Oni ne konas iujn ajn publikajn paroladojn de Lenin en tiu ĉi „krakova periodo“ de lia vivo. Tial estas tute nekredeble, ke Lenin rifuzis de sia taktiko por fari paroladon pri Esperanto antaŭ 1000 partoprenantoj de la Kongreso. Sed krom tiu ĉi supozo ekzistas pli gravaj konsideroj. Estas ankoraŭ vivantaj aŭ mortis antaŭnelonge kelkaj partoprenintoj de la VIII-a Esperanto-Kongreso. Forestas atesto de iu ajn el ili pri parolado de Lenin dum la Kongreso. En kelkaj esperantistaj gazetoj estis publikigitaj informoj, ke la ĉefa fonto de la supre nomita aserto estis la antaŭnelonge mortinta ukraina esperantisto Anatolo Koĥ, partopreninto en la Kongreso. En la jaro 1963 A. Koĥ sendis al la aŭtoro de tiu ĉi artikolo kopion de sia letero al IMEL. En tiu ĉi letero A. Koĥ protestas kontraŭ la ekzistantaj opinioj pri malfavora kaj argumentas per kelkaj faktoj pozitivan rilaton de Lenin



al Esperanto. Neniu mencio pri la suprenomita parolado de Lenin dum la Kongreso! Kaj, certe, Kōh ne povis forgesi tiun ĉi plej konvinkigan, frapantan ekzemplon.

Kategorie neas tiun ĉi „fakton“ alia kongresano S. A. Kovič (vidu lian artikolon en „Heroldo de Esperanto“ (N-ro 8 de la 16-a de majo 1969, pĝ. 2). La vicprezidanto de la Pola Esperanto-Asocio, la konata krakova esperantisto s-ro Marian Kostecki, jam dum kelkaj jaroj energie serĉas pruvojn pri la partopreno de Lenin en la VIII-a Kongreso. Li regule informas la aŭtoron de tiu ĉi artikolo pri la rezultoj de siaj serĉoj, kiuj, bedaŭrinde, dume estas senrezultaj. Male, kiel antaŭnelonge informis s-ro Kostecki, en varsovia ŝtata eldonejo aperis libro de fama pola socialisto d-ro Boleslav Drobner, kiu dum multaj jaroj estis kunlaboranto de V. I. Lenin kaj ofte kontaktiĝis kun li en Krakov. La libro enhavas pli ol 400 paĝojn kaj estas nomata „Bezugstanna walka“ (Senĉesa batalo“). La antaŭnelonge mortinta B. Drobner estis aktiva esperantisto kaj unu el la organizantoj de la granda kunveno de socialistoj-esperantistoj, okazinta en Krakov samtempe kun la VIII-a Esperanto-Kongreso (vidu pli sube). Priskribante en sia libro plej detale siajn rilatojn kun Lenin, Drobner eĉ per unu vorto ne mencias la partoprenon de Lenin en la Kongreso kaj en la socialista esperantista kunveno. Jam tiu ĉi ekzemplo sufiĉas por konstati nerefuteble: „*Lenin ne partoprenis kiel oratoro la VIII-an Esperanto-Kongreson, sekve Lenin ne povis tie eldiri la imputatan al li frazon de la kongrespodio pri Esperanto kiel latino de la proletaro.*” Sed eble Lenin eldiris la frazon menciitan en la rememoraĵoj de I. Ĉaĉe en iu alia tempo kaj en iu alia loko?

La frazo pri la lingvoprivilegioj ne estas elpensita, sed apartenas al Lenin. En sia artikolo „Kritikaj notoj pri la nacia problemoj“, verkita en oktobro-

decembro 1913 (do 1½ jaroj post la Kongreso!) Lenin skribis: „*Nacia programo de la laborista demokratio: neniu, senkondiĉe, privilegion al iu ajn nacio, al iu ajn lingvo*“<sup>11</sup>.

Al tiu ĉi Lenina frazo estas arbitre alkroĉita de I. Ĉaĉe la kvazaŭ Lenina eldiro pri Esperanto kiel lingvo de la proletaro, kaj tiu ĉi kunfandaĵo komencis sian marŝiron tra la esperantista mondo. En kelkaj landoj oni aperigis eĉ fotitajn poŝtkartojn kun portreto de Lenin kaj ambau tekstoj, kvazaŭ prezentantaj la vortojn de Lenin eldiritajn dum la kunsido de VIII-a Esperanto-Kongreso!

En la memoraĵoj de I. Ĉaĉe abundas aliaj, ne tiel gravaj malĝustaĵoj, malakurataj kaj malpreeizaj informoj. Kiel ekzemploj estu menciataj nur kelkaj. I. Ĉaĉe skribas, ke al la krakova kongreso Lenin venis piede el karpata kuracloko Poronino, kiu distancis 7 verstojn de Krakov. Sed Poronino situas proksime de kuracloko Zakopane (pli ol 70 km de Krakov) kaj Lenin tute ne estis devigita piediri tiun ĉi grandan distancon, des pli, ke kiel atestas N. K. Krupskaja, ŝi kaj Lenin translokiĝis al Poronino en aprilo 1913, ok monatojn post la krakova kongreso.

I. Ĉaĉe notas, ke la Tutruslanda (I-a sovetia) Esperanto-Kongreso okazis en Petrogrado en „la belega palaco de Aniĉkin“, (idente Aniĉkov — S. P.). Sed tiu ĉi aserto estas malĝusta. La Kongreso okazis en la Palaco de la estinta princo Sergeo, cara parenco. La palaco troviĝas sur la alia bordo de rivero Fontanka.

Kompreneble similaj malĝustaĵoj estas bagateloj, kompare kun la supremenciitaj, tamen ili estas tre multnombraj kaj nevole kreas malkonfidon al la rememoroj entute.

La lastaj okupis relative grandan spacon en tiu ĉi artikolo, ĉar I. Ĉaĉe

<sup>11</sup> V. I. Lenin, *Plena Verkaro*, vol. 24, 5-a eldono, pĝ. 118.

estas la ĉefa disvastiganto de la informoj pri la rilato de Lenin al Esperanto, sekve prenis sur sin la rolon de historiisto de la sovetia Esperantomovado, tuŝante unu el la plej respondecaj ĝiaj problemoj. Ĉiu historiisto devas plej singardeme kaj rigore kolekti faktojn, certigantajn liajn supozojn kaj *publikigi nur tion, kio estas nerefuteble atestata per dokumentoj*. Agante kontraŭe, la historiisto kaŭzas malutilon kaj al la historio, kaj al la socio.

*La dua fonto*, el kiu venas sciigoj pri eldiroj de Lenin rilate Esperanton kiel lingvo de la proletaro, estas rememoroj de la konata ĉena esperantisto *prof. Miloš*, kiu en la jaro 1950 publikigis artikolon en la revuo „Esperantisto Slovaka“ n-ro 34<sup>12</sup>.

En la artikolo, titolita „Esperanto — la lingvo de la tutmonda laboristaro“ *prof. Lukaš* rememoras, ke en la jaro 1920 li intervjuis la tiaman ĉefon de la sovetia misio en Praha, *d-ron Hillerson*, en la ĉeesto de tradukisto *Simon Eliović* el Harjkov. Hillerson asertis, ke li multfoje pridiskutis kun Lenin la problemon de lingvo internacia kaj ke Lenin nomis Esperanton „lingvo de la proletaro“. Jen la dua versio rilate la eldirojn de Lenin pri Esperanto. Tiu ĉi indiko, sendube, estas tre grava, sed, bedaŭrinde, ĝis nun estis neeble trovi iujn postsignojn de tiu Hillerson. Tamen en la respondo al sovetia esperantisto *A. Hovanski*, datita la 27-an de aprilo 1963 n-ro 010/480, la tiamas scienca sekretario de IMEL *M. Iskrov*, menciante diversajn rememorojn, indikas interalie Hillerson, pri kiu estis presite en la ĵurnalo „*Makeevskij raboĉij*“ („Laboristo de Makaveevka“) en Dona karboregiono (numero de la 29-a de marto 1958). Tial aperas grava tasko por la polaj, ĉeĥoslovakaj, moskvaj kaj ukrainaj esperantistoj-historiistoj de nia Movado daŭrigi siajn ser-

ĉojn por ricevi finfine klaran bildon pri la problemoj, kaj publikigi la rezultojn de ilia komuna laboro. *Kaj ĝis la fino de ilia laboro oni devas tute ĉesigi la disvastigon de la ne pruvitaj informoj.*

#### 4. Lenin — interesiĝanto pri internacia lingvo?

Estis analizitaj du vidpunktoj, diametre kontraŭaj unu al la alia: unua, deklaranta, ke Lenin estis kontraŭulo de Esperanto, la alia, ke Lenin estis fervora adepto de Esperanto kaj eĉ esperantisto. Evidentiĝis, ke ambaŭ vidpunktoj ne povas esti bazataj sur firma fundamento de nerifuteblaj faktoj kaj fidindaj dokumentoj. Tial povas aperi tria vidpunkto: *ke Lenin ne interesiĝis pri la problemoj de internacia lingvo kaj estis tute indiferenta rilate al Esperanto.*

Sed tiu ĉi vidpunkto estus same erara kiel la du antaŭaj. Ekzistas faktoj kaj argumentaj supozoj, ke Lenin ne preteriris tiun ĉi problemon, observis la esperantistan movadon, interesiĝis pri la eblo uzi ĝin por la celoj de la tutmonda revolucia movado. Ni transiru al la analizo de tiuj ĉi faktoj. Lenin loĝis en Krakov, kiam kunvenis la VIII-a Universala Kongreso de Esperanto, kiun partoprenis 1000 geesperantistoj. Por Krakov, tiam relative malgranda pola urbo, la internacia kongreso estis fenomeno neordinara, kiu ne povis ne alvoki grandan intereson de la tuta gazetaro kaj vastaj tavoloj de la loĝantaro. Kompreneble, Lenin sciis pri tiu ĉi Kongreso kaj, eble, eĉ vizitis iun el ĝiaj kunsidoj, kvankam, certe, ne oficiale. Sed la dua fakto devis elvoki multe pli grandan intereson de Lenin: temas pri la okazinta la 15-an de aŭgusto 1912 granda publika kunveno, kiun partoprenis 2000 homoj kaj kiu estis organizita laŭ la iniciato de la krakova komitato de la Pola Social-Demokratia Partio. En kieva ruslingva ĵurnalo „*Kievskaja Poŝta*“

<sup>12</sup> Tiun ĉi fakton komunikis al la aŭtoro s-ro Marian Kostecki, Pollando.



(Kieva Poŝto) n-ro 1129 de la 20-a de aŭgusto 1912, estis aperigita informo de speciala korespondanto de la ĵurnalo, V. Traĉevskij. Jen estas la teksto de tiu ĉi informo:

*„La 15-an de aŭgusto 1912, jaŭde, en la natura parko okazis publika kunveno pri la temo „Socialismo kaj Esperanto“, kiun partoprenis kelkaj miloj da lokaj enloĝantoj, por kiuj la paroladoj, faritaj en Esperanto, estis tradukitaj pollingven. Dum du horoj paroladis reprezentantoj de 8 nacioj, interalie ankaŭ unu el la redaktoroj de „Humanité“.*

*La kunveno akceptis tri resoluciojn, el kiuj unu estis platoneca („Pri ĉesigo de militoj“), sed la dua — pri la agnosko de Esperanto kiel kvara oficiala lingvo de socialistaj kongresoj, verŝajne estos efektivigita“.*

Jen estas la teksto de la dua rezolucio, kiu estis publikigita en Esperantista Dokumentaro<sup>13</sup>:

*„Kunvenintaj en Krakovo la socialistoj-esperantistoj opinias:*

*1. ke por efektiva realigo de socialistaj ideoj estas necesa helpa lingvo kiel dua lingvo de ĉiu kamarado kaj kamaradino,*

*2. ĉar la ideo de helpa lingvo internacia estas tiel grava, tial la socialistaj partioj de ĉiuj landoj devas klopodi pri tio, ke Esperanto estu enkondukota kiel eble plej baldaŭ, kiel, minime, nedevisa objekto en la lernejojn,*

*3. oni devas fervore klopodi, por ke Esperanto fariĝu la kvara lingvo de la internaciaj socialistaj kongresoj.“*

Ĉu estas eble, ke Lenin ne sciis pri tiu ĉi grava, multenombra kunveno, kies unu el la organizantoj estis la tiama proksima kunlaboranto de Lenin, pola socialisto Boleslav Drobner? Kompreneble ne!

Ne estas konate, ĉu Lenin ceestis

<sup>13</sup> Esperantista Dokumentaro. Oka Universala Kongreso de Esperanto (Krakovo, 11—18 de aŭgusto 1912). Paris 1913, pĝ. 163—164.

tiun ĉi kunvenon, tio estus tre verŝajna. Kaj same verŝajne, ke tiuj ĉi eventoj povis estigi ĉe Lenin ideon pri eventuala pozitiva rolo de Esperanto en la revolucia movado tutmonda. Kaj ĉu la sekvanta dokumento, aperinta post ok jaroj, kiu estas konsiderenda kiel la plej grava el ĉiuj atestiloj pri ebla rilato de Lenin al Esperanto, ne estis reeĥo de tiu ĉi ideo, aperinta en la jaro 1912? Jen tiu ĉi dokumento.

En la jaro 1920 kunvenis la II-a Kongreso de la Komunista Internacio. La tagordo de la Kongreso konsistis el 13 punktoj kaj la lasta el ili tekstis: „Pri Esperanto“<sup>14</sup>. Estas aldonita listo de la kongresaj dokumentoj kaj ĉe numero 20 oni legas: „Pri Esperanto“<sup>15</sup>. Estas ankaŭ aldonita listo de la problemoj, pri kiuj parolis la delegitoj, kaj kvanto da parolintoj. Inter la problemoj estas indikita „Pri Esperanto“, I-a parolado<sup>16</sup>. Bedaŭrinde, en la libro estas publikigitaj nur la plej gravaj resolucioj kaj la rezolucio pri Esperanto mankas. Eble eĉ ne estis speciala rezolucio.

Estas konate, ke Lenin estis la iniciatinto, fondinto kaj gvidanto de la Komunista Internacio. Ĝis lia malsano li plej aktive partoprenis ĉiujn laborojn de Komintern kaj gvidis la laboron de ĝiaj kongresoj. Estas absolute klare, ke Lenin aŭ iniciatis, aŭ almenaŭ subtenis la proponon enmeti en la kongreso, superŝutita per gravegaj problemoj, la diskutpunkton pri Esperanto. Legante tiun ĉi dokumenton oni povas klare vidi kiom ridigaj estas la vanaj penoj de la kontraŭuloj de Esperanto prezenti Lenin kiel homon, konsiderinta Esperanton utopia, morta, por neniu necesa lingvo.

En junio 1921 kunvenis la III-a Kon-

<sup>14</sup> 10 jarojn Komintern en decidoj kaj ciferoj. Informlibro pri la historio de Komintern, Ŝtata eldonejo Moskvo — Leningrado 1929, pĝ. 34.

<sup>15</sup> Samloke, pĝ. 34.

<sup>16</sup> Samloke, pĝ. 52.

greso de Komintern kaj denove la tagordo, konsistanta el 22 punktoj, enhavas specialan punkton „Pri internacia lingvo“<sup>17</sup>. Tiu ĉi fakto atestas, ekster iu dubo, ke la intereso, kiun havis Lenin rilate la eventualan eluzon de Esperanto por la celoj de internacia laborista movado, estis ne hazarda kaj rapide preteriranta, sed firma kaj longedaŭra.

Tial estas tute ne mirinde, ke kiam en la sama jaro 1921 sovetiaj esperantistoj petis la registaron, kies gvidanto estis Lenin, permesi kunvokon de la Tutrusia Esperanto-kongreso por organizo de Tutlanda Esperanto-Asocio, ili ricevis aprobon kaj subtenon flanke de la registaro. La kongreso kunvenis en junio 1921 en Petrogrado. Pli ol 200 esperantistoj, venintaj el ĉiuj partoj de la lando, eĉ de malproksimaj Mezazio, Jakutio kaj Malproksima Oriento, dum kvin tagoj kunsidis en luksa palaco. Ili ĉiuj havis senpagajn biletojn, senpagajn loĝejojn kaj nutraron. La Kongreso fondis SEU (Sovetrespublikara Esperantista Unuiĝo) kun centro en ĉiuj sovetiaj respublikoj, urboj kaj urbetoj. SEU disvolvis grandan organizan, propagandan kaj instruan laboron, eldonis dank' al la malavara financa kaj materiala subteno de la registaro grandan nombron da lerniloj, politikan, sciencan kaj beletran literaturon kaj kelkajn revuojn. Oni devas speciale atentigi, ke tiu ĉi subteno de la esperantista movado flanke de la sovetia respubliko estis efektivigata dum tre malfacila vivperiodo de la juna sovetia ŝtato: tiam ankoraŭ ne estis tute venkitaj imperiistaj intervenintoj kaj kontraŭrevoluciuloj, ankoraŭ ne estis likviditaj la postsekvoj de la intercivitana milito, la lando estis minacata de malsatego, kiu en la jaro 1921 furiozis en la apudvolgaj regionoj.

En tiu ĉi artikolo estas neeble prikskribi ĉiujn aliajn faktojn montrantajn

pozitivan rilaton de Lenin al la ideo uzi la Internacian Lingvon por la celoj de la internacia laborista movado.

Interalie grandan intereson prezentas la agado de la Esperantista Sekcio de Komintern (ESKI), kiu fondiĝis en la jaroj antaŭintaj la jaron de la Sovetlanda Esperanto-Kongreso. Tiu ĉi organizaĵo, kies fondiĝo, certe, ne povus okazi sen la konsento de Lenin, bedaŭrinde, ne postlasis publikitajn materialojn.

## 5. Zorge kaj skrupule analizi

La granda tasko, kiu staras antaŭ ĉiuj esperantistoj-historiistoj, precipe en la socialismaj landoj, estas: zorge, skrupule kolekti ĉiujn faktojn kaj dokumentojn, kiuj nerefuteble atestas pri la pozitiva rilato de Lenin al Esperanto, analizi ilin, kontroli ilian ĝustecon kaj publikigi ilin. Samtempe necesas akre kontraŭbatali ajnajn provojn de la kontraŭuloj de Esperanto, kiuj penas per falsigitaj informoj „pruvadi“, ke Lenin estis kontraŭulo de la Lingvo Internacia. Samakre oni devas kontraŭbatali tiujn adeptojn de Esperanto, kiuj, manipulante per nepruvitaj kaj nepruveblaj famoj kaj onidiroj, penas troigi la rilaton de Lenin al Esperanto, fari el Lenin esperantisto ktp. Ili ne komprenas, ke tiel agante, ili kuniĝas kun la malamikoj de la esperantista movado, verŝanta akvon en la muelejon de la malamikoj de Esperanto. La progresemaĵoj esperantistoj en la tuta mondo devas streĉi siajn fortojn por praktike pruvi, ke Esperanto povas grave helpi la tutmondan revolucionan movadon, la konstruadon de la socialismo kaj komunismo, la atingon de firma paco sur la tero kaj tiel servi la ideojn, por kiuj luktis Lenin. Tiel agante, la progresemaĵoj esperantistoj faros decan omaĝon al la granda pensulo, revoluciulo kaj gvidanto, kies 100-jaran jubileon nunjare celebras la homaro.

<sup>17</sup> Samloke, paĝoj 57 kaj 78



kun Branimir Grigorov — ĝenerala direktoro de la Societo por Ekstera Komerco „Hemus“ — Sofio

La prezidanto de la Komisiono por Esperanto-agado ĉe Bulgara Esperantista Kooperativo petis la ĝeneralan direktoron de la So-

cieto por Ekstera Komerco „Hemus“, k-don Br. Grigorov, respondi al iuj demandoj.

**Demando:** Kamarado Grigorov, la esperantistoj montras viglan intereson pri la verkoj, per kiuj Societo „Hemus“ komercas. Pro



tio ĉu vi povus dividi kun ili opinion pri iuj momentoj el la aktiveco de „Hemus“?

**Respondo:** Antaŭ ĉio mi profitas la okazon danki pro la atento kaj la intereso, kiujn la esperantistoj montras al la agado de nia Societo. Kvankam koncize, mi respondos kun plezuro al la tiel metita demando.

La Societo por Ekstera Komerco „Hemus“ en Popola Respubliko Bulgario efektiveigas eksporton kaj importon de presitaj verkoj kaj verkoj de arto kaj kulturo. Kion pli konkrete signifas tio.

Al la internacia merkato „Hemus“ proponas kaj vendas librojn el plej diversaj branĉoj de la scienco kaj tekniko; verkojn de famaj bulgaraj poetoj kaj verkistoj en originalo aŭ tradukitajn; lukse fasonitajn eldonaĵojn pri demandoj kaj problemoj de la arto. Tiurilate ni disponas pri la tuta produktaĵo de ĉiuj bulgaraj eldonejoj.

Nia Societo estas eksportisto de ĉiuj ĉiutagaj ĵurnaloj, semajnaj kaj monataj eldonaĵoj. Eksterlande ĝi povas liveri gazetojn kaj revuojn, kiuj traktas problemojn de la arto, literaturo, tekniko kaj sciencoj, medicino, politiko, juro, filozofio, sociologio, matematiko, turismo, modo k. a.

Grandan sukceson ĝuas en fremdlando la bulgaraj gramofondiskoj, kiuj ankaŭ estas objekto de nia agado. Ni eksportas gramofondiskojn de simfonia kaj alia muziko, plenumita de elstaraj bulgaraj kantistoj kaj orkestroj. Ĉiam pli bonan akcepton trovas ankaŭ la verkoj de la belarto. La eksportataj bildoj prezentas ĉiujn generaciojn de la bulgaraj pentristoj ekde la komenco de la pasinta jarcento ĝis hodiaŭ.

Seriozan kvoton en nia laboro okupas ankaŭ la eksporto de artaj memoraroj — produktoj de la Fonduso ĉe la Asocio de Bulgaraj Pentristoj. „Hemus“ vendas altartajn memorarojn kaj donacojn mane ellaboritajn el forĝita fero, ledo; popolkutimajn teksaĵojn kaj brodaĵojn, lignovogravuraĵojn, ceramikon, juvelaron, pupojn en naciaj kostumoj, kartojn kun ornamalmetaĵoj kaj kolorajn. La numizmatiko kaj la filatelo ankaŭ estas ĉe ni. En la sfero de la societo estas ankaŭ la maklerado por cedo de aŭtoraj rajtoj kaj patentoj en la koncerna kampo de la krea agado, poligrafiaj servoj k. a. Nun, vice kun la Asocio de Bulgaraj Pentristoj kaj la Asocio de Bulgaraj Komponistoj, estos akceptita en la Societo ankaŭ la Asocio de l'Arkitektoj en Bulgario. Kune kun ĝi ni laboras sur unu nova kampo — la eksporto de arkitektaj projektoj.

**Demando:** Kiaj estas la rezultoj de la komerco per bulgara kaj fremda literaturo dum la kuranta jaro kaj la perspektivoj por 1971?

**Respondo:** Nia baza agado estas la komerco per libroj, revuoj kaj gazetoj. Ilia parto en la efektiveigita varŝanĝo dum la 10 monatoj de la kuranta jaro estas 63%. En la eksporto ĝi prezentas 52%, kaj en la importado — 71%. Inter niaj plej grandaj kontraktantoj viciĝas: „Mejdunarodnaja Kniga“ — Sovetunio, „Deutscher Buch“ — GDR, „Kollet's“ — Britlando, „Kubon & Sagner“ — GFR, „Pegasus“ — Nederlando, k. a.

Dum la Tria Internacia Foiro de la Libro, kiu okazis en Sofio de la 11-a de oktobro ĉi-jare, ni subskribis novajn komercajn kontraktajn kun multaj organizaĵoj kaj firmaoj el diversaj landoj. Estis kontraktitaj ankaŭ 47 titoloj de bulgaraj aŭtoroj, kiujn oni eldonos en fremdajn lingvojn.

**Demando:** Ĉu la libroj kaj la revuoj en Esperanto prezentas intereson por via Societo?

**Respondo:** Kompreneble. La intereso estas natura, ĉar ni estas komercistoj en tiu ĉi branĉo. Malgraŭ ke ĝis nun ni ne havas negocojn por Esperanta literaturo, tion estonte ni faros nepre. Mi rapidas tuj klarigi, kial mi pensas tiel. Por la momento ni estas pristudentaj nek la amplekson kaj la eblecojn de la interna bazaro por debito de importa Esperanta literaturo, nek ni scias sufiĉe pri la intereso eksterlande al bulgaraj libroj en Esperanto. Evidente, ĉe tiu situacio ni povas esperi, ke post sistema laboro ni atingos pozitivajn rezultojn. Mi opinias, ke oni povas trovi valuton por importo de certa kvanto da Esperantaj libroj kaj revuoj. Pri tiu demando ĝis nun neniu interesigis nin.

**Demando:** Jam stariĝis rilatoj inter Societo „Hemus“ kaj Bulgara Esperantista Kooperativo, kiu disvastigas la Esperantajn eldonojn en nia lando. Kiel vi pritaksas tiujn ĉi rilatojn, kaj ĉu oni povas atendi rezultojn de tiu ĉi kunlaboro?

**Respondo:** Kun Bulgara E-Kooperativo nuntempe ni laboras por solvi demandojn lige kun la intereso de iuj fremdaj organizaĵoj kaj firmaoj al bulgaraj libroj en Esperanto. Ni ambaŭ ne sukcesis aranĝi ilian

vendadon en Aŭstrio dum la 55-a Universala Kongreso de Esperanto. Tial jam ekde nun ni komencas komunan laboron por eltrovi firmaon, kun kiu ni povus ĝustigi kaj kontrakti la kondiĉojn por debito de libroj en Londono dum la 56-a Esperanto-kongreso venontjare.

Tie ĉi mi deziras atentigi la esperantistojn, ke ĉi-jare jam por tria fojo en nia lando okazis la Internacia Foiro de la Libro. De ĉie oni donis bonegajn pritaksojn kaj ĝi pasis ĉe granda intereso. La ciferoj mem elokvente konfirmas tion. Jen: pasintjare la Foiro partoprenis eldonejoj kaj firmaoj el 18 landoj, ĉi-jare — el 23 landoj (527 eldonejoj).

Kun la helpo de BEK, de aliaj Esperanto-organizaĵoj kaj de la esperantistoj mem oni povus fari klopodojn por organizi ekspozicion ankaŭ de Esperanto-literaturo dum la Foiro en 1971. Tie povas trovi sian lokon komercistoj kaj eldonistoj de Esperantaj libroj. Por sia bona prezentado en simila forumo meritas, ke la interesantoj serĉu ĉiujn eblecojn. Ni estas pretaj helpi por realigo de tia ekspozicio.

Novembro 1970 j.

Faris la intervjuon: *Dimitr Mutuŝev*

## ESPERANTO AMIKIGAS LA BONVOLEMAJN HOMOJN

En 1968 j. mi vizitis someran Esperanto-tendaron en v. Zanĉov — Ĉeĥoslovakio, kie mi finis kurson de Esperanto. En la tendaro estis multaj geesperantistoj el diversaj landoj, inter kiuj mi ekhavis bonajn amikojn — Nemeti Jozef kaj Fajsz Karoli el Hungario, Maria Podhradská kaj Ruĵena Hejkrilikova el ĈSSR, Margitta Wolter el GDR k. m. a.

Post mia reveno en Bulgarien mi komencis regulan korespondadon kun miaj novaj geamikoj.

En la somero de 1969 mia amiko Nemeti Jozef vizitis min kaj restis unu semajnon en mia domo.

En 1970 mi ricevis inviton viziti GDR. Mi febre preparis ĉion kaj en aŭgusto forveturis. La veturado tra Rumanio, Hungario, Ĉeĥoslovakio estis tro longa — 53 horojn. Sed malgraŭ la laciĝo mi estis tre feliĉa, kiam en urbo Neunruppin mia amikino Margitta Wolter renkontis min. En ŝia domo mi estis kore akceptita. Speciale ĝoja mi estis pro tio, ke mia amikino jam parolis tre bone Esperanton (en la tendaro, kiam ni konatiĝis, ŝi sciis nur kelkajn vortojn). Mi vizitis ankaŭ la domon de

s-ano Ludwig Schödl (Sjödl), kie kolektiĝis multaj esperantistoj el la urbo. Poste mi estis invitita viziti du junularajn E-grupojn, kie mi rakontis pri nia lando kaj pri nia E-movado.

Dank' al mia amikino Margitta mi vizitis la ĉefurbon de GDR—Berlinon — kaj Potzdam.

La lastan urbon, kiun mi vizitis en GDR estis Leipzig (Lajpcig). Ĉi tie mi gastis al mia amiko Max Nitsche (Maks Niĉe). Li afable kondukis min al la fama Leipzig-foiro, al la muzeo de Georgi Dimitrov k. a.

Post kvartaga restado ĉe Max Nitsche mi forveturis al Hungario. Bedaŭrinde, mi ne trafis (pro mia malfruigo per du tagoj) mian amikon Nemeti. Hejme estis nur lia avino. Ŝi renkontis min ege afable, sed — malbono: ŝi parolis nur la hungaran, el kiu mi eĉ vorton ne konis. Ankaŭ la gepatroj de mia amiko parolis nur hungaran. Sed de unu letereto, kiun li lasis por mi, mi komprenis, ke li foriris al Pecz por ekzamenoj, sed baldaŭ revenos. Li petis min atendi. Do, mi atendis. Kaj jen — mia kara amiko alvenis. Minuton ni ne parolis, nur gaje brakumis nin. Poste ekfluus



## GRAVA DATREVENO

La 29-an de oktobro j. k. en la ĉefurba kvartalo „Triâgâlnika“ okazis solena celebrado kun koncerto, dediĉita al la 50-jara datreveno de l'naskiĝo de la patrono de Popola Kulturdomo (legejo) „Stilijan Peŝev“. En la koncert-



programo partoprenis elstaraj artistoj. Ĝi estis varia, riĉa kaj altnivela. La solenaĵon ĉeestis la patro de Stilijan Peŝev kaj ties fratino Pravda. Honoris la celebradon per sia ĉeesto ankaŭ altrangaj sociagantoj, proksimaj amikoj kaj kunbatalantoj de Stilijan: d-ro Vladimir Bonev — la unua vicprezidanto de la Centra Konsilantaro de Patrolanda Fronto, generalo kolonelo Slavĉo Trânski-vicministro de la Popola Defendo, k. a. Ĉeestis ankaŭ intimaj amikoj de la heroo kaj multaj gastoj el la kvartalo. Lige kun la celebrado la organizintoj eldonis specialan ĵurnalon „Stilijan Peŝev“ kun interesa kaj varia enhavo: artikoloj de d-ro Vl. Bonev, generalo Sl. Trânski, la ĵurnalisto Nikola Tomov — intima amiko de Peŝev (en kiu li speciale parolas pri lia amo al Esperanto), k. a.; pentraĵo de Stilijan mem kaj lia originala versaĵo de

Esperanto; la versaĵo „Balado pri Stilijan Peŝev“ de la poeto Ljubomir Levĉev kun muziknotoj de melodio, komponita de L. Sargaev, k. a.

Ĉe la solenaĵo raporton pri la nobla vivo kaj batalo de Stilijan Peŝev faris Nikola Tomov. En la nomo de CK de Bulgara Esperantista Asocio salutis la solenaĵon Ivan Sarafov — sekretario de CK de BEA.

Stilijan Peŝev (partizana nomo Stanĉo) estas bela figuro en la batalo kontraŭ la faŝismo. Li naskiĝis la 30-an de julio 1920 en Sofio. La patro Nikola Peŝev estis poŝtoficisto kaj la patrino, Vasilka, popola instruistino. Kiel lernanto en la tria knaba gimnazio Stilijan eniris en la vicojn de la Laborista Junulara Asocio (RMS). Poste kiel studento li estis en la unuaj vicoj de la studentaj bataloj. Laboremaj kaj sciama, Peŝev lernis diligente la marksismon. Li estis progresema junulo kaj energie partoprenis la agadon de abstinenculoj, turistoj kaj esperantistoj. Laŭ liaj konceptoj, se la homo devas esti bona sociaganto, li ne devas drinki, do li devas esti abstinenculo; li devas ami kaj ŝati la naturon, do li devas esti turisto; li devas havi amikojn en aliaj landoj, kun kiuj li devas korespondi kaj interkompreniĝi, do li devas lerni la Internacian Lingvon. Kaj Peŝev lernis kun siaj kamaradoj kaj bone posedis la lingvon. Li eĉ tradukis pecojn el la literaturo kaj estis aktivulo en la Movado. En tiu tempo li ricevis Esperantajn revuojn kaj korespondis kun esperantistoj el diversaj landoj kiel Hispanio, Nederlando k. a.

En 1939 Peŝev finis la gimnazion kaj fariĝis studento en la jura fakultato. Tiam li aktive laboris en la Bulgara Ĝenerala Popola Studenta Asocio (BONSS) kaj vigle partoprenis ĉiujn studentajn batalojn. En 1941 li estis aktiva membro de la kooperativa grupo „Fakel“ („Torĉo“) kaj plivigligis la agadon de la kulturdomo „Svetlina“ („Lumo“), kiu disvastigadis klercon inter la laboristaro de la periferia ĉefurba kvartalo „Voenna Rampa“. Samtempe li estis respondeculo de la kvartala eksterleĝa RMS-organizaĵo kaj al tiu ĉi laboro li dediĉis sian tutan junularan energion.

Sed la polico observis lian entuziasman laboron kaj je la 8-a de marto 1942 ĉe kunsido de la gvidantaro de RMS oni arestis kaj kruele torturis lin. Tamen li perfidis neniun. Poste

la Esperanta interparolo. La avino kaj la gepatroj venis speciale por vidi, kiel oni povas paroli en tiu nekonata por ili nova lingvo. Aŭskultante nian liberan amikan interparadon, ili estis vere kortuŝitaj, en la okuloj de la avino, eĉ aperis larmoj. . .

Dum la sekvantaj tagoj mi vizitis la ur-

bojn Vac, Gødollo, Budapeŝto. Ĉie mi vidis interesajojn.

Mi restis tre, tre kontenta de mia Esperanto-vojaĝo. Vere mi praktike konstatis, ke Esperanto proksimigas kaj amikigas la bonvolemajn homojn.

Doĉko Doĉev — Varna



*En la prezidantaro: d-ro Vladimir Bonev  
generalo Slavco Trânski.*

oni sendis lin al koncentrejo Krâsto Pole (en nuna Greklando). Tie li restis 20 monatojn kaj en oktobro 1943 estis liberigita.

La koncentrejo estis por li vera universitato. Tie li legis „La Kapitalo“-n de Karl Marks, la historion de la filozofio, la historion de la Komunista Partio de Sovetunio kaj lernolibrojn pri juro. En la koncentrejo oni akceptis lin kiel membron de Bulgara Komunista Partio.

Pešev revenis hejmen, sed ne restis longe.

### **SUKCESA E-KUNVENO EN ORJAĤOVO**

La 9-an de novembro j. k. en nia urbo Orjaĥovo gastis k-do Manol Ĉolev el Velin-grad. Nia E-societo organizis kunvenon, kie k-do Ĉolev rakontis pri la internaciaj E-kongresoj, kiujn li partoprenis. Sian prelegon — „Per Esperanto tra la mondo“ — li akompanis per projekciado de bildoj pri la vizititaj landoj.

La ĉeestantoj-esperantistoj kaj neesperantistoj — restis tre kontentaj de la prelego. Al nia kara gasto ni montris la rimarkindaĵojn de la urbo kaj la insulon „Esperanto“ en Danubo.

*Georgi Stanev*

Liaj samkoncentreĵanoj Vlado Triĉkov kaj Goĉo Gopin (lia kuzo) jam estis partizanoj sub la gvido de la fama Slavĉo Trânski. Stiliĵan Pešev havis okazon konatiĝi kun Slavĉo Trânski en la policejo, kie ili estis en unu kaj sama ĉelo. Pešev senpacience atendis sciigon de Vlado kaj Goĉo. Kaj jen Vlado venis en Sofion kun speciala misio, kaj portis mobilizitan invitilon al Pešev, nome — ke li devas iri en la taĉmenton de Slavĉo Trânski. La revo estis efektivigita, la ĝojo estis grandega, ĉar ĉe unu el la punktoj de la partizana transiro ilin atendis Slavĉo Trânski mem. La adiaŭo kun la plej proksimaj homoj — liaj hejmanoj — estis korprega, iliaj okuloj estis plenaj je larmoj, sed Stiliĵan trankvile diris: „La vojo estas peza, ĝi ne estas surŝutita de rozoj, ĝi estas malfacila kaj pro tio glora. Do, ĝis baldaŭa revido! La eventoj rapide disvolviĝas. La venko estos nia. Baldaŭ la patrolando estos libera!“ Li kaj lia kamarado d-ro Georgi Nastev iris al la partizana tendaro.

En tiu tempo la partizana taĉmento plikreskis kaj dividiĝis je du trupoj — unu, sub la komando de Slavĉo Trânski, iris al Rila-montaro, la dua — sub la komando de Denĉo Znepolski — al Balkan-montaro. Pešev estis en la lasta. Ekfluis la tagoj de la peza, sed glora partizana vivo.

En majo 1944 j. post dektaga streĉa kaj malfacila irado la dua brigado alvenis apud vilaĝo Batulija, regiono de Sofia, kie nigra perfidulo denunciis ilin. Ekbolis batalo senkompata, kruela, pereis la batalionestro Diĉo Petrov, la brigado estis venkita. La partizanoj dissemiĝis je malgrandaj grupoj kaj poste eĉ unuope.

Stiliĵan Pešev kaj iu lia kamarado kaŝis sin kelkajn tagojn en la montaro sen nutraĵo, ĝis kiam malamikoj malkovris ilin kaj komencis pafi kontraŭ ili. Ambaŭ kamaradoj ankaŭ pafis kaj mortigis du policianojn. La ceteraj multnombraj policianoj bestigis. La rondo ĉirkaŭ la herooj pli kaj pli malvastiĝis. Fine la policianoj sukcesis kapti ilin. Tio okazis la 5-an de junio 1944.

*(sekvas sur p. 13)*

*Ankaŭ vi povas grave kontribui al la disvastigo de Esperanto inter laborantoj en la urba transporto, se vi sendus al ni: fotojn de tramoj, aŭtobusoj, trolebusoj kaj urbaj fervojoj, konduktoroj kaj kondukantoj, fakajn eldonaĵojn — gazetojn, prospektojn, afiŝojn, biletojn k. s. La materialojn ni utiligos por aranĝo de migranta ekspozicio. Ĉiu sendinto de materialoj estos re-kompencita. Ĉion oni sendu ĝis la fino de marto 1971 al: **Urba Transporto, Esperanto, bulv. „G. Dimitrov“ 82, Sofio, Bulgario.***

Post kruela torturado la policianoj frigis la arestitojn al stacidomo Rebrovo, kie oni montis al ili du tranĉitajn kapojn de partizanoj kaj demandis, kies ili estas. Anstataŭ respondi Stilijan prenis unu el kapoj, kisis ĝin kaj diris: „Balkan, kara Balkan, ni sekvas vin, fraĵo, kaj nin sekvas milionoj. La venko estos nia!“ (Balkan estis lia sampartizano).

La malamiko kompreneble, ke Stilijan scias kies estas la kapoj, ili volis, ke li diru tion kaj kie troviĝas la ceteraj partizanoj. Sed li silentis. Oni batis lin kruele, sed sukcesis eligi de li nur la aŭdacan respondon: „Mi ne diros!“ Denove oni kruele batis lin, kaj denove ankoraŭ pli aŭdaca respondo: „Mi ne diros!“ Kvarfoje oni torturis lin, sed ne sukcesis eligi de li eĉ vorton de perfido.

Finfine oni irigis la du kamaradojn al la polica gardostarejo, kie atendis arestitaj aliaj sep personoj, kaj la sekvintan tagon per kamioneto oni veturigis ilin al la stabo de la sangavida generalo Koĉo Stojanov. La generalo ordonis, ke oni konduku la arestitojn en direkto al vilaĝo Stolnik kaj ĉe ŝajna provo por forkuro mortigu ilin.

Tiel pereis la batalinto por popola libero Stilijan Peŝev. Li pereis, sed la popolo ne forgesis lin. Lia nomo brilas en la plejado de



*Inter la ĉeestantoj—ankaŭ la patro de St. Peŝev (unua vico, dekstre de gen. Trânski)*

plej fidelaj kaj sinoferaj liaj gefiloj. Nun la kulturdomo en la kvartalo „Triâgálnika“ portas lian gloran nomon — „Stilijan Peŝev“. Ĝi disvolvas vastan kulturen agadon. La junuloj el la kvartalo sekvas la vojon de sia patrono.

*Ivan Sarafov*

### IMITINDA INICIATO

La Kulturdomo de la Sindikato de Komerc-laboristoj en Sofio havis tre bonan iniciaton — organizi kune kun la Komisiono por Turismo ĉe Bulgara E-Asocio kunvenojn, en kiuj esperantistoj prelegos pri siaj vojaĝoj al eksterlando. Celo: plialtigi la konojn de la komerc-laboristoj rilate la kulturon de vendado kaj priservo, pliriĉigi ilian ĝeneralan kulturon, eduki ilin en spirito de patriotismo kaj internaciismo. Samtempe la prelegoj vekos intereson pri Esperanto en la ekstera publiko.

La kunvenoj okazos unu fojon en la monato en la rubriko „Tra la mondo per Esperanto“. La prelegantoj parolos — kompreneble en nacia lingvo.

La unuan prelegon faris je la 5-a de novembro Kunĉo Vălev. Li rakontis al la ĉeestantoj pri Aŭstrio — la lando de la 55-a Universala Kongreso de Esperanto — kaj pri la kon-

greso mem. Estis projekciitaj kolorfilmoj pri Aŭstrio.

Tre utile estus, se ankaŭ aliloke oni realigos similajn iniciatojn. Iniciatoj devas esti ĝuste niaj lokaj Esperanto-societoj aŭ sekcioj, aŭ distriktaj komitatoj, aŭ unuopaj aktivuloj. La sekvoj de komuna labro inter esperantistoj kaj sindikataj organizoj povas esti nur pozitivaj por nia E-afero. La utilo estos reciproka. Ĉe sindikatoj (ankaŭ ĉe legejoj, ĉe turistaj, porpaciaj, komsomolaj, patrolandfrontaj kaj aliaj organizoj) la esperantistoj trovos publikon (tre grave: neesperantistoj!) kaj ejojn — ambaŭ tiujn ili ĉiam bezonas kaj serĉas. Kaj tiuj neesperantistaj organizaĵoj pliriĉigos kaj refreŝigos sian kulturklerigan agadon per novaj prelegantoj.

*Kovo*

### U TAN RESPONDIS

Fine de aŭgusto j. k. en la belega ripozloko Borovec okazis renkontiĝo de esperantistoj el Sudokcidenta Bulgario, pri kiu nia organo jam donis informon (vd n-ro 9). La partoprenantoj sendis telegramon al la ĝenerala sekretario de UNO s-ro U Tan. El la kancelario de s-ro U Tan responde al tiu ĉi telegramo, la esperantistoj en urbo Samokov ricevis la jenan leteron:

*Gesinjoroj,*

*En la nomo de la ĝenerala Sekretario mi havas la honoron konfirmi la ricevon de la mesaĝo, kiun vi bonvolis sendi al li.*

*La ĝenerala Sekretario prenis noton de viaj bondeziroj por paco kaj li dankas, ke vi adresis vin al li.*

*Mi petas vin kredi, gesinjoroj, en nia bonega al vi estimo.*

*Nanette B. Rodney*

## EN DOSPAT DUAN JARON ESPERANTO

En la sinoj de Rodopi-montaro, en urbo Dospat, jam duan jaron sonas Esperanto-parolo. Dum la pasinta jaro ĉi tie fakultative studis la lingvon kaj sukcese finis la studadon unu klaso da lernantoj. Ankaŭ grupo da junuloj.

Membroj de la nova E-societo „Rodopa Stelo“ vizitis kelkajn socialismajn landojn, kio entuziasmigis la novajn esperantistojn.

La nova lernoĵaro komenciĝis tre bone. En la meza lernejo fakultative lernas Esperanton pli ol tridek lernantoj. Tiuj, kiuj pasintjare lernis la lingvon, nun daŭrigas sian perfektigadon en Esperanto-rondo.

Okaze de la naskiĝtago de Zamenhof la lernantoj preparis riĉan programon.

Plej grava sukceso de Esperanto en Dospat estas la kurso por instruistoj. Ĝin partoprenas dudek personoj.

„Rodopa Stelo“ fariĝis vera stelo de Esperanto en tiu ĉi parto de nia patrolando.

*La estraro de „Rodopa Stelo“*

### III PUPTEATRA INTERNACIA FESTIVALO (PIF)

En oktobro ĉi-jare en Zagreb okazis la 3-a Internacia Pupteatra Festivalo. Partoprenis ĝin pupteatroj el ĈSR, GFR, Hungario, Rumanio kaj Bulgario.

La organizado de la Festivalo estis bona. Ĉiuj spektakloj pasis ĉe alta disciplino. La sola lingvo parolata de la artistoj kaj aŭskultata de la publiko en ambaŭ festivalaj urboj Zagreb kaj Sisak (8000 infanoj), estis Esperanto.

La Festivalo daŭris de la 5-a ĝis la 11-a de oktobro. La tuta antaŭvidita programo estis realigita. Ĉiuj partoprenintaj pupteatroj estis profesiaj, escepte de la bulgara, kiu estis amatora. Ĝia kolekto konsistas el infaninstruitinoj el Sofio. La teatro ekzistas jam 23 jarojn kaj havas altajn kreadajn sukcesojn. Ĝi estas laŭreato de la 2- kaj 3-a bulgaraj naciaj festivaloj de amatora arto, honorita per altaj distingoj. Malgraŭ la nelonga sinpreparo (la teatra kolekto komencis lerni Esperanton nur antaŭ 3 monatoj!) ĝia lingva nivelo estis bona. La ceteraj profesiaj kolektoj sin prezentis laŭ arteca kaj lingva posedo en tre bona formo.

La 3-a Pupteatra Internacia Festivalo denove brile respondis al la demandoj de Anna Predescu-Utto, delegitino de la Rumana Komitato por Kulturo kaj Arto, al Boĵo Kukolĵa, prezidanto de Kroata Pupista Asocio, kaj al aliaj kompetentuloj — ĉu Esperanto estas la plej taŭga lingvo? Ĉu ĝi ĝenerale povas esti sceneja lingvo? Se jes — en kioma grado? La ĝisnunaj tri festivaloj forigis ĉiujn dubojn. Ili pruvis, ke Esperanto prezentas eblecon realigi diversspecajn pupteatraĵojn, kiel ajn kolorite verkitajn, redonitajn en iu ajn poezia aŭ proza,

filozofia aŭ komedia formo. La sola kondiĉo: la verkoj estu kreitaj aŭ tradukitaj de bonaj poetoj kaj verkistoj, konantaj perfekte Esperanton.

Koncerne la bulgaran kolekton, en la personoj de Simeon Hesapĉiev (tradukinto de la prezentita teatraĵo „Kiu ne scias sian nomon“) kaj Stefan Kiraĝiev (kiu instruis Esperanton al la artistoj), la problemoj estis bone solvitaj.

En la kadro de la 3-a Festivalo okazis simpozio en ĉeesto de direktoroj, reĝisoroj, scenografoj, artistoj, esperantistoj kaj aliaj gvidfaktoroj. Ĉiuj emfazis la gravan rolon de la pupismo ĝenerale kiel unu el la plej amataj artospecoj por infanoj, kiel faktoro por ilia edukado, ĝian lokon en la revomondo de la infanoj. Oni ŝanĝis spertojn inter diverslandaj pupteatroj, pridiskutis antaŭstarantajn taskojn kaj unuanime decidis, ke ĉiu pupisto estigu esperantisto.

Tri ĵurioj — faka, lingva kaj infana — prijuĝis la premiojn. En la konsisto de la lingva ĵurio partoprenis: Tibor Sekelj (Jugoslavio), Julia Sigmond (Rumanio), Preben Bagger (Danlando), Emilija Lapenna (Jugoslavio) kaj Zvonko Rehoric (Jugoslavio).

Ĵurianoj de la infana komisiono, kiuj juĝis kaj pri la lingvo, kaj pri la ludo, estis: Michel Imbert (Jugoslavio), Alen Gregurek (Jugoslavio), Margareta Rieth (Hungario), la fratoj Aleksandro kaj Flaviani Corrado (Italio), Tripalo Branka (Jugoslavio) kaj Velčić Vlatka (Jugoslavio), kiuj destinis la trian lokon al la Bulgara Amatora Pupteatro de la Infaninstruitinoj ĉe la Domo de l'Instruisto en Sofio por la teatraĵo „Kiu ne scias sian nomon“ de Pančo Manĉev kaj Marija Grekova.

La unuan kaj duan premioloĝojn okupis la kolektoj el Rumanio kaj Ĉeĥoslovakio.

La festivaloj de la pupteatroj estas grava atingo ne nur por la fakuloj-pupistoj, sed ankaŭ por la esperantistoj. Ili estas imitindaj modeloj pri tio, kiel la esperantistoj povas ligi sin kaj la E-movadon kun la ekstera mondo, aplikante praktike la Internacian Lingvon.

*Rajna Arnaudova*

### AL FESTIVALO KAJ SEMINARIO EN POLLAND

Varsovio renkontis nin per forta pluvo kaj koregaj ridetoj de niaj amikoj — Teruo Matzumoto kaj Elżbieta Leonova. Ripozinte unu tagon en la bela pola ĉefurbo kiel gastoj de Teruo, ni forveturis al Bjalistoko, la urbo, kie devis okazi la 2-a kulturfestivalo de Pola E-junularo (22 ĝis 25-a de julio). En la klubo de la vojevodia nacia konsilantaro okazis la solena malfermo kun inaŭgurprelego de k-do Henryk Kaszkowiak pri „Bjalistoka regiono en la 25 jaroj de Pola Popola Respubliko“. Poste oni malfermis tre interesan pentro-skulpt-kaj grafikekspozicion de esperantistoj.



Interesa estis la deklamarta konkurso. Nia samideano kaj aktoro-amatoro Stefan Dimitrov gajnis la unuan premion per „Ĉe la disiĝo“ de Ĥr. Beĉev. La trian premion gajnis la studentino el Plovdiv Marija Ŝatova. Si plenumis „La Vojo“-n de Zamenhof.

La diskuta konkurso „Esperanto kaj la kultura agado“ kunigis multajn ĉeestantojn. Ĝin partoprenis reprezentantoj de kvar nacioj — bulgaro (la vicprezidanto de BEJ inĝ. Nikola Uzunov), polino, germano, francino. Sed la konkurso „Kanto ne konas limojn“ venigis plej multe da aŭskultantoj. Sin prezentis kelkaj polaj knaboj. Ekster la konkurso kantis bulgara samideanino el Dimitrovgrad.

La sekvantan tagon okazis ekskurso „laŭ la vojo de la gloro de Pola armilaro“. La vetero estis bela, sed niaj koroj estis malĝojaj, ĉar ni vidis la arbarojn, kie la faŝistoj mortpafis milojn da poloj. Longe ni staris antaŭ la monumentoj, dediĉitaj al la 15 000 pereintaj polaj soldatoj, kiuj kuraĝe batalis kontraŭ la hitleristoj.

Vizitado de Bjalistoko okazis la lastan tagon. La bela palaco de Bran'cki — la plej potenca homo post la pola reĝo Poniatowski — impresis nin per sia bona stilo kaj imponaj dimensioj. Sed ankaŭ ĉi tie la faŝistoj multon detruis kaj la pola popolo devis ripari la palacon. La bela ĝardeno kun altartaj statuoj inspiris al ni trankvilecon kaj serenecon. Ne tiom granda, sed ne malpli bela estas la somera palaco de Branicki, ĉirkaŭita de ĝardeno kun skulptaĵoj. Nia grupo sukcesis supreniri la ŝtuparon de 350 ŝtupoj en la Blanka Preĝejo kaj vidi de tie tutan Bjalistokon. Sed la plej kortuŝa estis nia vizito de la loko, kie naskiĝis Zamenhof. La iama domo estas detruita. Sur ĝia loko staras nova, kelketaĝa konstruaĵo. Sur unu el ĝiaj muroj estas memortabulo pri nia kara Majstro.

La 25-an de julio vespere ni forveturis al Torun. En Bjalistoko pluvis, kvazaŭ la urbo ploris ĉe nia disiĝo kun ĝi. Lacigitaj pro la tutnokta veturado, ni okupis sidlokojn en granda aŭditorio de la Universitato „Nikolao Kopernik“ en Torun. La seminarion salutis reprezentantoj de dek nacioj kaj la Universitata rektoro. Post tio k-do Marian Kostecki — vicprezidanto de Pola E-Junularo, inaŭgurprelegis pri „V. I. Lenin en Pollando“. Malgraŭ nia laciĝo ni aŭskultis tie atente, ĉar la raporto estis ege interesa. Posttagmeze prelegis d-ro Hans Eichhorn el GDR pri „Lenin kaj Germanio“.

La tutaj ses tagoj en Torun estis plenplenaj de interesaj kaj allogaj iniciatoj. Estis projekciado de du filmoj pri Lenin, vizito de ekspozicio pri Lenin en la universitata biblioteko, renkontiĝo kun la plej junaj esperantistoj de Torun, kiuj bonege posedis la lingvon, ŝipa ekskurso laŭ Visla, internacia balo en kafejo „Zamkova“, ekskurso laŭ „la vojo

de Piastoj“ (Piast estas la unua pola reĝa dinastio). Ni vidis Gnieznon — la unua ĉefurbo de Pollando, Biskupin — kie troviĝas la plej malnova ĝis nun malkovrita loĝejo de homo de antaŭ 2500 jaroj, Kcynia — kie oni belege plenumis polajn popolajn dancojn kaj kantojn, Bydgoszcz — la voevodia urbo, kie loĝas ĉirkaŭ 450 000 homoj.

Sed kune kun la ekskursoj kaj la amuziĝo la partoprenintoj serioze laboris. La ĉefa temo de la seminario estis „La penso de Lenin kaj la internacia laborista movado“. Impreson faris la fakto, ke preskaŭ ĉiuj 14 prezentitaj raportoj estis altnivelaj. La bulgaroj montris grandan aktivecon. Ili prezentis 5 raportojn, el kiuj du ricevis premion. La unuan premion oni aljuĝis al Bojka Batalaska (Sofio), la duan — al unu kamarado de GDR kaj la trian al Spiro Donĉev (Sofio).

Bojka Batalaska gajnis ankaŭ la trian premion en la konkurso „Kion vi scias pri Pollando“.

La lastajn tagojn oni dediĉis al organizaj problemoj. Oni diskutis pri la lingva problemoj en la internaciaj junularaj rilatoj, pri problemoj de TEJO, pri sendeviza interŝanĝo de junularo k. a.

La 3-an de julio oni disdonis la premiojn kaj ni disiĝis kun gastema Torun — la naskiĝurbo de Kopernik, nun centro de la esperanta studenta agado en Pollando.

B.

## REKOMENDO PRI LA LINGVO DE LA PROKSIMA ESTONTECO

Sub tiu titolo aperis en Honkongo artikolo pri la Internacia Lingvo Esperanto kaj pri la E-movado, verkita de Li Uaj Kit. Parolinte pri la multlingveco en la mondo (ekzistas pli ol 3000 lingvoj) kaj la malfacilaĵoj, kiujn ĝi kaŭzas por la kontaktoj de diversnacioj kaj por la evoluo de la tuthomara kulturo, la aŭtoro mencias la provojn krei „azajn lingvojn“ (simile al la tiel nomita „Basic English“ — „Bejsik Inĝliŝ“), kiuj plene fiaskis, kaj la provojn krei artefaritajn lingvojn antaŭ Esperanto, kiuj ankaŭ fiaskis.

En la pli granda parto de sia artikolo Li Uaj Kit rakontas pri la kvalitoj kaj la sukcesoj de Esperanto — vivanta kaj solide konstruita lingvo, kiu ricevis rekonon de multge da filologoj kaj aliaj intelektuloj, de sociaj agantoj, de homoj de la literaturo kaj la arto, rekonon de vastaj popolamasoj, kiuj lernas kaj uzas ĝin en siaj ĉiutagaj kontaktoj. Li substrekas, ke Esperanto estas lingvo de amikeco inter la homoj.

Je la fino de sia artikolo la aŭtoro konkludas, ke unu tiel fama internacia haveno, kiel Honkongo, bezonas nepre la Internacian Lingvon Esperanto

B. Batalaska

## EN KUBO INTERESO PRI ESPERANTO

*La Ministerio pri Edukado de Kubo entreprenas paŝojn por enkonduki la instruadon de Esperanto kaj sisteme organizi en Kubo la Esperanto-movadon. Tion sciigis la Ministerio mem per laŝtatempaj leteroj al CED kaj al la Brita Esperantista Asocio en Londono.*

*Kiel unuan paŝon la provinca direkcio de la Ministerio en Havano starigis oficialan Esperanto-komisionon, kiu ricevis la taskon kompili detalan raporton pri la konveno de la instruado de Esperanto en ĉiuj lernejoj kaj universitatoj de Kubo. La raporto estas prezentota al la estroj de la eduka fako de la revolucia registaro de Kubo. Ĝi devas pritrakti, interalie, la ĝisnunajn atingojn sur la kampo de Esperanto-instruado en aliaj landoj kaj la rolon de internacia lingvo en la moderna mondo, precipe por landoj ne evoluintaj.*

*Ĝis nun ekzistis en Kubo nur malforta Esperanto-movado kun 3—4 kluboj en diversaj urboj po maksimume 20 membroj. La Ministerio jam en septembro komencis kontaktojn kun la ekzistantaj Esperanto-grupoj kaj la preparadon de novaj instruistoj.*

*El revuo „Esperanto“ de UEA, n-ro 11/1970*

## UNUA CENTRA RENKONTIĜO DE LA ESPERANTISTOJ DE GDR

Je la 25-a ĝis la 27-a de septembro 1970 en Karl-Marks-Stadt okazis la unua tutrespublika renkontiĝo de la esperantistoj de Germana Demokratia Respubliko. Partoprenis ĝin pli ol 200 delegitoj. En la ĉefreferaĵo komerca konsilisto Rudi Graetz, la prezidanto de Centra Laborrondo Esperanto de GDR, impresis bilancis la sukcesan 5-jaran periodon en la laboro por kaj per Esperanto en GDR. Li povis montri interesan kaj solidan perspektivon: en fakgrupoj „teoriaj problemoj de la Esperanto-laboro“, „metodiko“, „junularo“, „esplorado de historio de LEA“, „interlingvistiko/esperantologio“ k. a. Estis pritrakitaj specialaj aspektoj de la multflanka agado de la esperantistoj en GDR.

Arta programo, ekskursoj kaj diversaj vesperoj donis la kadron de tiu ĉi bonege akceptita aranĝo. La tutrespublika gazetaro informis pri la renkontiĝo.

## RUMANA KUNORDIGA ESPERANTO KOMITATO

*La 29-an de aŭgusto okazis en Covasna (Rumanio) tutlanda esperantista renkontiĝo. La 144 partoprenantoj el 26 urboj decidis starigon de „Rumana Kunordiga Esperanto-Komitato“, kies celoj estas kunordigi la agadon de la Esperanto-rondoj, funkciintaj ĉe*

## MOVIĜANTA KONGRESO EN MEDITERRANEO

„Por konvinki neesperantistojn, estas plej bone rekomendi al ili unu tagon vivi inter esperantistoj. . .“ Per tiu saluto de la vicministro pri internaj aferoj de Italujo s-ro F. Nicolazzi komenciĝis la 41-a Itala Kongresoen Genova la 19-an de septembro.

325 kongresanoj, inkluzive de 102 ne-italaj esperantistoj el 16 landoj, enŝipiĝis en la ŝipon *Caribia* kun pli ol 500 neesperantistaj pasaĝeroj. Inter ili estis 2 italaj parlamentanoj, senditaj de la registaro por vivi ne unu tagon, sed unu semajnon inter esperantistoj.

Tie, kie la ŝipo haltis, atendis en la haveno lokaj esperantistoj kaj krome ĵurnalistoj, en Barcelono bonvenigis la kongresanojn 165 hispanaj esperantistoj kun floroj. En kelkaj lokoj oni demandis pri Esperanto, vidinte la grandan indikon „... kongreso de Esperanto“ ĉe la antaŭaj fenestroj de la ekskursaj aŭtobusoj aŭ la grandan E-flagon sur la masto de la ŝipo.

En la ŝipo mem estis informada efiko sufiĉe granda. Oni aŭdis ĉiutage esperantlingvajn informojn pere de laŭtparoliloj kaj ĉiutagaj manĝoservoj. Okazis Esperanto-kursoj surŝipe. En baloj oni aŭdis esperantlingvajn modernajn kanzonojn de 2 junaj kongresanoj; en maskobalo akiris la unuan premion itala esperantistino. La organizantoj de la kongreso sukcesis aperti la onidire fermitan Esperanto-rondon inter la publiko.

Aparte menciindaj estas la tre bone farita interpretado de la juna doktoro Carlo Minnaja ĉe la inaŭguro kun la ĉeesto de ĵurnalistoj kaj aŭtoritatuloj observantaj, kaj tio, ke Esperanto verŝajne estos enkondukitita en mezlernejojn en Italujo laŭ propono de la Lerneja Komisiono por la Ĉambro de la Deputitoj, kies prezidanto esias G. Romanato, „esperantisto ekde la 41-a Itala Kongreso“.

El la Estraro de UEA ĉeestis la kongreson prof. I. Lapenna kaj s-roj E. L. M. Wensing, E. Carlén kaj E. J. Woessink. Dum la inaŭgura solenaĵo en Genova parolis prof. Lapenna, kiu transdonis al la kongreso la salutojn de UEA. Ĉiuj 4 estraranoj iamaniere kontribuis al la kongreso sian energion dum la krozo: i. a. prof. Lapenna prelegis pri Esperanto antaŭ internaciaj instancoj, aparte pri la eventoj en Montevideo en 1954, kun aŭdigo de bendo pri la lasta tiea kunsido de Unesko, kiu akceptis la konatan rezolucion, kaj s-ro Wen-

*Kulturdomoj, ebligi interŝanĝon de spertoj kaj apogi la kreon de novaj kulturdomaj Esperanto-rondoj. La prezidanto de la Komitato estas Jozefo Petrin kaj la ĝenerala sekretariino Maria Vitalyos (C. P. 14, Tirgu-Secuiesc, jud. Covasna).*



## MISKOMPRENO

**Turisto:** Ĉu en tiu ĉi urbo naskiĝis ankaŭ grandaj viroj?

**Ĉiĉerono:** Ne, sinjoro, nur malgrandaj infanoj!

## VANTA JUNULO

Estas knaboj, kiuj opinias ke ili jam estas viroj, kaj iras al razejo por razi sin.

Simila angla knabo vizitis iun razejon kaj volis, ke oni razu lin. La razisto sidigis la knabon zur la seĝon, sapumis lin kaj poste forlasis lin sola. Samtempe li ekstaris ĉe la pordo kaj komencis paroli kaj ridi kun sia kolego.

La juna gentlemano atendis kelkajn minutojn kaj ekkriis:

— He, sinjoro, kial vi lasis min atendi tiom da tempo?

La razisto respondis trankvile:

— Mi atendas, ĝis elkreskos al vi barbo.

*El angla: Janka Daskalova*

## Solvo de la vortenigmo en № 5

1. Spartak. 2. Maksim. 3. Moskva. 4. Taĉanka. 5. Donbas. 6. Avrora. 7. Poltava. 8. Marica. 9. GOELRO. 10. Budjoni. 11. Pravda. 12. Erevan.

## Solvo de la vortenigmo en № 7—8

**Horizontale:** 1. Epopeo. 4. Reto. 8. Inter. 9. Raspa. 10. Oro. 11. Ofte. 14. Ĉasti. 17. Inklino. 19. Simio. 20. Inko. 22. Kaj. 24. Kruta. 26. Utila. 28. Inic. 29. Pilolo.

**Vertikale:** 1. Etiko. 2. Ont. 3. Edro. 5. Eks. 6. Okazi. 7. Kroĉi. 12. Tim. 13. Eni (gmo). 15. Ani. 16. Son. 18. Kakao. 19. Sakri. 21. Omaro. 23. Juki. 25. Uzi. 27. Ino.

sing gvidis la kursojn, kunlabore kun d-rino Dazzini, laŭ rekta metodo. Okaze de la fermo, ili kvarope danke donacis florojn al ges-roj Grattapaglia, kiuj kun ĉiama rideto perfekte organizis la kongreson.

Je la 30-a de septembro itala televid-stacio, tre konata, dissendis la filmojn de la okazintaĵoj dum la kongreso.

El revuo „Esperanto“ de UEA, n-ro 11/1970

**Ĉefredaktoro:** Kunĉo VÂLEV

**Redakta komitato:** Tatjana EVSTRATIEVA, Dimitr ÎDRAKOV, Dimitr MITEV, Venelin MITEV, Ivan SARAFOV, Simeon D. SIMEONOV.

Korektis: Vasja Petrova

Sofio, poŝtkesto 66

Tel. 83-26-82

# KURIOZAJ FAKTOJ

## KIEL AŬDAS LA INSEKTOJ

Preskaŭ ĉiuj insektoj havas aŭdorganon, sed iliaj oreloj situas iom neordinare. Akrido aŭdas per paro da oreloj troviĝantaj sur la malantaŭaj La oreloj de la grilo, male, troviĝas sur la antaŭaj kruroj. Muŝoj kaj kuloj perceptas la sonon per lipharetoj-antenoj. Tiuj antenoj estas kovritaj de multnombraj tre sentemaj haretoj, kiuj intense vibras eĉ de plej malforta sono. En la fino de ĉiu hareto estas ganglio — ĝuste ĝi transdonas al la cerbo signalon pri la perceptata sono.

La insektoj diferencigas ĉiujn kolorojn. Ekzemple la abelo difirencigas la kolorojn escepte la ruĝan, kiun ĝi perceptas kiel nigran. La okulo de l'abelo estas multe pli sentema ol la homa. La plejmulto de la insektoj reagis al la koloroj.

## LA PLEJ MALJUNA ARBO EN LA MONDO

En Japanio sur insulo Jakuŝima estas malkovrita la plej maljuna arbo en la mondo. Tio estas cedro kun ĉirkaŭo de 16 metroj. La kalkuloj de la sciencistoj diras, ke la arbo havas 7200 jarojn.

*Elektis kaj tradukis el bulgara:*

*Evgeni Vasilev —*

*lernanto de IX klaso, Sofio*

## AMIKA INVITO

Nia E-klubo „Mevo“ troviĝas en la Marista Klubo en Jalta. Ni kunvenas ĉiufoje, je la 19 h. En la ceteraj tagoj ĉi tie deĵoras klubano. Ni invitas ĉiujn esperantistojn vizitintajn Jalta, viziti ankaŭ nian E-klubon. Ni renkontos ilin amike. Ankaŭ skribu al ni — ni deziras korespondi kun ĉi pri ĉi.

**Adreso:** Interklubo—Maristoj, Esperanto-klubo „Mevo“, Jalta.

**Poŝtadreso:** Esperanto-klubo „Mevo“, pk 33, Jalta, Krimeo, Sovetunio.

En la nomo de la E-klubo en Jalta: Vladimir Kurguzov.

En ĵ. „**Rabotničesko Delo**“ (1. IX. 1970): „Rekontiĝo de esperantistoj“ — informo de Nano Nanov pri renkontiĝo en Borovec de esperantistoj el Sudokcidenta Bulgario.

En la sama ĵurnalo (11. IX. 1970): „Esperanto — la insulo de la turistoj“ — informo de I. Borisov el Vraca pri la Danuba insulo, kiu troviĝas 5 kilometrojn oriente de Orjaho-vo kaj de post 1930 j. portas la nomon „Esperanto“.

En ĵ. „**Ĥaskovska Tribuna**“ (3. IX. 1970): „Novaj amikoj de Bulgario“ — artikolo de G. Idakiev pri la gastado de polaj studentoj-esperantistoj kaj de itala esperantista familio en Ĥaskovo.

En la sama ĵurnalo (29. IX. 1970): „La esperantistoj aktivas“ — artikolo de Ĵeko Zap-rianov pri distrikta E-konferenco, okazinta la 27-an de septembro en Ĥaskovo.

En ĵ. „**Trojanski glas**“ (9. IX. 1970): „Kun ĝojo mi aŭskultadis pri Trojano“ — artikolo de Coĉo Kolarov pri la gastado en Pollando, partopreno en la internacia laborbrigado kaj ĉe-esto en la E-festivalo de la pola junularo.

En la sama ĵurnalo (16. IX. 1970 — informo, ke oni malfermos E-kurson en Trojano.

En ĵ. „**Veĉerni Novini**“ (10. IX. 1970): „Amikeco inter du urboj“ — informo de K. Genĉev, ke la korda kvarteto de Pazargik gas-tis al la E-societo en Bjalistok, Pollando, naskiĝurbo de la kreinto de Esperanto D-ro L. L. Zamenhof.

En la sama ĵurnalo (14. IX. 1970) en la arti-kolo „Wunderkind“ la aŭtoro Zahari Petrov mencias Esperanton.

En ĵ. „**Ŝumenska Zarja**“ (21. IX. 1970): „Kun riĉaj impresoj“ — informo de Cvjatko Todorov pri E-kunveno en Ŝumen, en kiu oni raportis pri la 55-a E-kongreso en Vieno.

En la sama ĵurnalo (6. X. 1970): „Plifirmi-ĝas la amikaj kontaktoj“ — informo de Cvjatko Todorov pri la amikaj interrilatoj de espe-rantistoj el Ŝumen kun esperantistoj el Dres-deno, Sverin kaj Verdau (GDR).

En ĵ. „**Narodno Delo**“ (2. X. 1970) — in-formo, ke en Varna oni malfermos E-kur-sojn.

„**Stilijan Peŝev**“ (29. X. 1970) — memor-gazeto, numero ununura, 4-paĝa, eldonita de la organizaĵoj de BKP kaj la organizaĵoj de Patrolanda Fronto de 14-a sekcio, Il urboparto, kaj Legejo „Stilijan Peŝev“, kvartalo Triâgâl-nika, Sofio. Respondeca redaktoro Georgi Vaj-silov. La gazeto aperas okaze de la 50-a dat-reveno de la naskiĝo de St. Peŝev. Ĝi enha-as multajn materialojn pri la sindona junulo-cmunisto, patrioto kaj esperantisto, kiu pe-is en 1944 en la kontraŭfaŝisma batalo.

## FORPISIS PASTRO DIMITR ANDREEV

En Sofio la 1-an de oktobro j. k. forpasis en sia 86-jara aĝo nia samideano pastro Di-mitr Andreev. Jam lernanto li ellernis la In-ternacian Lingvon kaj restis fidela ĝia adepto dum sia tuta vivo. En Esperanton li tradukis multajn filozofiajn artikolojn.

En la kadroj de la 48-a UK de Esperanto en Sofio (1963) post la esperantlingva meso pastro Andreev faris prelegon en Esperanto.

Dum la tempo de la kapitalismo en nia lando li ofte helpis senlaborajn kaj perseku-tatajn komunistojn, trovante por ili laboron aŭ kaŝante ilin.

En sia tuta vivo li estis senlace laborema kaj sciema homo. Li regule observis la dis-volviĝon de la politika, ekonomia kaj kultura vivo en nia lando kaj en la tuta mondo. Nur kelkajn minutojn antaŭ sia subita morto li diris al sia filino: „La kapitalistoj nur volas preni, sed nenion donas. La socialismo kreas kondiĉojn por reeduko de la homo — li ŝanĝiĝos kaj kleriĝos. Tiam perfektiĝos la homa menso, kaj venos la fino de la militoj. . .“

*Vâskresen Atanasov*

---

Pereis pro akcidento la 5-an de novembro j. k. en Kazanlâk

## TODOR ĴELEV

longjara esperantisto, delegito de UEA.

---

Forpasis la 31-an de oktobro en Sofia

## SNEĴINA LIRKOVA

tre vigla esperantistino, prezidantino de la amatora pupteatro ĉe la Centra Domo de la Instruisto en Sofia.

---

La 18-an de novembro pereis pro akcidento en Ruse

## DIMITR IVANOV

longjara esperantisto, fervora disvastiganto de la Internacia Lingvo.

Niajn kondolencojn al la funebrantaj famili-anoj de la forpasintaj!

---